
# AVENO 34
# Julio 2010



Karaj geamikoj,
Kion ni deziras de la politikistoj kaj similaj respondeculoj:
Abolicion de Atomenergio, Mortpuno, Torturo, Diktaturo.
Pli da ekologia respekto kontrau la alia vivantaro. Pli da demokrata partopreno sur chiuj sociaj niveloj. Helpi solvi konfliktojn juste kaj paceme por preventi mortigan fanatismon. Internacie puni kruelojn de soldatoj au policistoj kontrau civiluloj. Justan dividon de la komunaj resursoj kaj redukti la ekonomian malegalecon. Limigon de la kvanto da homoj kaj bredbestoj sur difinita tereno pro ekologiaj kaj pacemaj kauzoj. Necesas preventi koruptajn strukturojn, sed subteni la civilajn strukturojn en pluraj landoj por plibonigi la viv-situacion de la homoj.

**Enhavo:**


1 Fiksdatoj – aktualaj kaj kelkaj pasintaj okazajhoj
2 Ghenerala informilo por 2010
3 Amendopropono: Dauropoveco por la UEA-Statutoj
3 AVE - 26 jaroj kun la Verdaj Partioj
Retmesaghoj dum la jaro 2009:
4 Ekologio, Ekonomio, Agrikulturo, Akvaroj, Sano
8 Homaj kaj Bestaj Rajtoj, Paco
11 Verdaj Partioj, AVE kunlabore kun la VP


**Dankon** al multaj kiuj subtenis nian agadon: traduki kaj korekti, organizi kunvenojn, konvinki la Verdajn Partiojn (Francio, Germanio, Europo) pri la potencialo de Esperanto.
La bazo de nia sukceso: **via kunlaboro**.

**Venontaj Renkontighoj de AVE-anoj:**

2010-08-01/06, Braŝovo (RO), SAT-Kongreso, ekologiisma frakcio & AVE (?)

2010-08-14/21, Ch. Budejovice (CZ), EKOTUR, kava-pech.cz, publika kunveno de AVE (?)

2010-11-18/21, Modra che Bratislava (SK), KAEST http://www.ikso.net/kaest/

2011-07-23/30, Kopenhago (DK), UK, AVE-Kunveno.

**Aprilo-26** (de,en,fr,it) www.Chernobyl-day.org

**Junio-15** Ventoenergio-Tago, www.globalwindday.de

**Novembro-17**: Internacia Tago de Studentoj: rememore al viktimoj de totalitarismaj reghimoj.

**Okazis :**
2010-07-23, Havano (CU), UK, (Vilhelmo Lutermano)

2010-06, Ulan Bator (Mongolio), Azia Esperanto Kongreso (vershajne, Mireille Grosjean)
Retejo, multaj informoj, alighilo: mongolio.info

2010-06-11/14 Karlovo, Internacia Seminario, Prelegoj Plastajhoj en akvaroj;
Argumentoj kontrau Atomenergio.
2010-05-21/24, Kaiserslautern, franca & germana Esperanto-Kongreso (AVE-Kunsido)

2010-01, Bruselo, Europaj Verduloj, Heerlen
2009-08-22/29, Svitavy (Chehhio), EkoTur, kun AVE renkontigho. Krom en-natura migrado au biciklado ni audis prelegon pri "Verda Ekonomio" & "Videblaj kaj nevideblaj sekvoj de plastajhoj en la akvaroj". EkoTur estas favorpreza arangho. www.kava-pech.cz

2009-07-25ff, Bjalistoko (PL), AVE-Kunveno okaze de la 94-a UK, respondeculo Michael Leibman.

2008-05-01/04, Sao Paulo (Brazilo), Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj. AVE-kunsidon k. inform-tablo pri lingva politiko: ww.globalgreens.info

2008-08-28/31, Frankfurt/Oder (DE) & Slubice/Odra (PL), Eŭropa Kongreso de la Verdaj Partioj. AVE organizis laborgrupon pri "Lingva Politiko" kaj inform-standon kadre de la Verda Foiro.

**Pensu amplekse - Voĉdonu Verde**
Aktuale: baloto-kampanjo por la Europa Parlamento - 2009-06-07 tekstoj en Esperanto: Verduloj.org
Europaj Verduloj: Manifesto 2009
Verda Nova Konsento por Eŭropo

AVE – Statistiko: entute 335 membroj kaj abonantoj .
36 nur abonantoj de Aveno, el kiuj 10 estas asocioj;
95 virinoj, 230 viroj;
65 membroj de ia Verda au simila Partio.

**Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)**
Jara Kotizo (propono, inkluzivas la mendon de Aveno)
A-Landanoj kaj "riĉuloj": 5+x EUR, B-Landanoj: 2 EUR
Pagenda al nia UEA-Konto: avex-z
aŭ letere per monbileteto (EUR, au USD, SFR, …).
Prefere transpagi al la nederlanda UEA-poshtkonto:
IBAN: NL24PSTB0000378964, BIC: PSTBNL21
notico: (de "via nomo" por Kto. avex-z)


**Sekretario:** Manfred Westermayer, *mi* (de 1947), kemiisto (laboris ĉe farmacia entrepreno je kampo de spektroskopio). Ni vivas apud Freiburg/Br., aktivas en la germana Verda Partio.
**Adreso:** Manfred Westermayer/ AVE
Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen
Ret-adreso: AVE@verduloj.org
Ret-pagharo: www.Verduloj.org
Preferas: "ch..u; cx...ux", NHA/ *.txt , *.rtf

**Pri AVE:** La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda NRO (Ne-Registara Organizaĵo). AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj).

**AVE Filozofio:** Realigo de pensado kaj agado lau la principo, ke la vivo kaj ne (sole) la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de chiu evoluo sur tiu chi planedo. Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neutraleco" kaj "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas Bela". Ni favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon.

**AVE Celoj:**
* Ni pensas tutmonde; niaj membroj agas surloke.
* Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel internacia komunikilo ene de Verda Movado.
* Peranta agado inter la Movadoj Verda & Esperanto.
* Enkonduki en la UEA-statuton la amendon, kiu metas la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por chiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de la Homaj Rajtoj kaj deklaras ilin bazo de la UEA-laboro.

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. El la fondintoj: Christopher Fettes (AVE-NOvaĵoj, redaktoro de AVENO), Jean-Claude Thumerelle, (sekretario ĝis 1991), Maire Mullarney (mortis 2008, vidu #33), W. Guenther, Ute Haas, Emilo Mas ('Sunradioj 1' = Aveno 6), Claude Rouget. 1991 okaze de la unua eŭropa kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko - kun interpretado de la ĉefaj prelegoj en Esperanton fare de Claude Piron kaj Farjon de Lagatinerie - dank' al niaj francaj geamikoj kaj la svis-verda kongres-organizanto Hans Beat Schaffner. Manfred Westermayer transprenis la AVE-sekretarion de E. Mas. La AVE-kunsidantoj en Gotenburgo, UK 2003, aklamis la neformalan statuson de AVE.

**Stukturo de AVE:** AVE ĝis nun estas nura reto da homoj; estas neformala asocio do, sen plena demokratio. La sekretario estas la afergvidanto. "Estraro - sekretario:" <manfred@westermayer.de> "Estraro - verdaj partianoj:" <george.sossois che compaqnet.be> kaj Provizoraj Komitatanoj

**Kunlaboro:** AVE kunlaboras unuflanke kun UEA kaj SAT, aliflanke kun la Verdaj Partioj, ni tradukis dokumentojn de la Federacio de la Eŭropaj Verdaj Partioj: "Gvidliniojn" kaj Manifeston (2009). Kaj ni tradukis la "Ĉarton de la Tutmondaj Verduloj", kiu estis decidita en aprilo 2001 en Canberra (AU) okaze de la 1-a Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj: globalgreens.org

**Agado de AVE en la Esperanto-Mondo:**
Kompreneble AVE kunlaboras kun diversaj Esperanto-Organizajhoj kiel UEA, SAT kaj EEU; kaj regule AVE kontribuas pere de kunsidoj kaj prelegoj, ekz-e en Maribor (EEU 2007) pri la temo "Akvo kaj plastajhoj". Ni ankau kunvenis enkadre de ekologiaj okazajhoj kiel "Ekologio kaj Turismo" (Riga)
Rilate Europunion, por subteni la atingon de federa sistemo, ni agas kunlabore kun EEU kaj samcele kun UFE (Unuigho de Federistoj Europaj), reprezentata de Johano-Karlo Rinaldo. Vidu je: www.verduloj.org.

Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por eble publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Kaj ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo. Interŝanĝo de opinioj pere de la interreta diskutlisto Verduloj. Por aliĝi, bonvolu viziti: lists.riseup.net/www/info/verduloj
Bonvolu alklaki "subscribe" - poste vi ricevos ret-mesaĝon (angle), ke vi devus resendi konfirmilon.

**Temoj de komuna aktiveco de AVE:**
Ekologio, Sociala Justeco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, Milito kaj Paco, Konfliktsolvado pere de nemilitaj agadoj. AVE dissendas informojn rete, kaj chiujare sur-paperigas la kolekton: AVE-NOvajhoj. Detale:
: **besto-protekto**, ekz-e preventi torturojn je tenado kaj transportado;
: helpi regajni la **Aral-Maron** en Centra Azio; ni sub-tenis projektojn de arboplantado por senpolvigi la aeron kaj por bona kvalito de la trinkakvo; ni eldonis broŝureton. Ni kunlaboris kun "Aralsee-Hilfe", kiu rezignis, ĉar la uzbeka registaro malhelpis la kun-laboron. Kasahhio sukcesis revivigi la nordan parton.
: ni subtenas la projektojn "**Mazingira Salama**" de Mramba Simba (TZ), www.kono.be/mazingira/
: informo pri kaj **tradukado** de gravaj tekstoj de la Verda Movado; la tekstoj sur nia retejo - kaj kelkaj haveblaj e-poŝte aŭ papere (* 2 EUR +sendokostoj)):
Politikaj Gvidlinioj de EFVP, 1994, (16 paĝoj)
Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2001, (*12 p.)
Ekologiaj-Impostoj (4 p.), Paco-Politiko (3 p.)
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.)
Ĝenerala Konvencio pri la Komerco en la Servoj (2 p.)
Europa Manifesto de la Verdaj partioj, 2004 (3 p.)
Charto (2006) & Manifesto (2009) de la EVP
Ekologio de la Homo, Sokolev, tradukis T. Auderskaja, 1996/2008, (51 p., 5 EUR)
La Verdula Libro (Verda/EFA Frakcio en la EP (-2009)
100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio (sur nia retejo – kun multaj ligiloj), germane kiel broshuro.
Plastajhoj en la akvaroj - videblaj kaj nevideblaj sekvoj (prelego-dosiero).

Por **membriĝi** al AVE, bone se vi estas membro de iu Verda Partio, sed tio ne necesas. Almenau vi devas akcepti niajn Celojn kaj Filozofion. Bonvolu informi AVE se vi aktivas en iu ajn NRO aŭ partio. La ĉefa celo de via membriĝo ne estu propagandi Esperanton en la partio au NROo sed uzi ghin. En 2010 pere de AVE konektighas ch. 335 membroj kaj simpatiantoj.

**Kotizo:** La mono estas por la UEA membreco kiel faka asocio, UK-salonoj, aliaj renkontejoj kaj por dissendo de la papera Aveno, kiu ekde 2010 estas sendata nur al novaj membroj kaj kotizintoj. Aktiva kunlaboro validas. Detaloj trovighas sur pagho 1.

**Amendo-propono por la Statutoj de UEA:**
Jam 1998 je la postkongresa seminario al la UK en Montpellier, en Larzac-Regiono, AVE diskutis la statutojn de UEA - kaj sekve sendis leteron por amendi ilin. 1999 dum la UK en Berlino okazis vochdono pri ni amendo-propono ene de UEA, bedaurinde negative. 2006 la UK-temo en Florenco estis: "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daurigebla evoluo", sed ne eblis diskuti nian amendon (letero de 1998-09-06 al UEA):
La sekva diskuto devus okazi 2011 en Kopenhago.

Do, jen la amendo-propono de 1998-09-06 de AVE :
**Amendi la UEA-Statuton** per kroma punkto A.3.d
(la cifero rilatas al la statuto de 1980 - pardonu):
**"eduki inter siaj membroj la konsciencon, ke iliaj agadoj devas akordi kun la Principo de Dauripova Evoluo sur nia planedo"**

2009-11 Wolfgang Guenther, EcoMed, verkis detalan argumentadon (literoj NHA y=j, j=gh, kh=hh, zh=jh):
Al la estraro de la UEA & al kiuy koncernatas:
Estimatay gesamideanoy, vi chiuy scias pri la strebado de esperantistay ekologoy & de ekologie interesatay esperantistoy (ekz. tiuy en AVE, la Asocio de Verduloy Esperantistay, kunlaboranta kun UEA ekde 1994, kp. la yarlibron) koncerne ekologian amendon de la UEA-statuto, bazitan sur la imanenta ekologia memidenteco de Esperanto (kp. mian artikolon en Scienca Revuo, vol. 60 (2009) (2), n-ro 217, Interna ideo, homay raytoy kay ekologia perspektivo) & sur la nocio “dauropov(ec)a evoluigo”, kiuy la UN & la civilsocio chirilate uzas.
Chiletere mi atentigas vin & la ceterayn oficialayn Esperantistayn organizazhoyn, ke kun dato de 2009-09-02 la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioy (EKE) akceptis: “Deklaracion pri Ekoyusteco & Ekologia Debeto”. En ji sub punkto H. tekstas yene:
La centra komitato “urje alvokas la EKE-membroeklezioyn & ekleziayn instancoyn partnerece kun la civilsocio efektivigi provaudoyn pri la ekologia debeto, inklude memtakson pri la propra konsumsinteno. La EKE precipe evoluigu mekanismoyn cele kompensadon de dum siay kunvenoy estijantay ekologia debeto & kolektu partnerece kun grupoy & movadoy de la civilsocio modeloyn de agnosko, prevento, mildigo, kompenso, reparacio & rekompenco de ekologia debeto.” Yuste chi tio estas ankau unu el la chefay celoy de supre menciita amendo. Mi konsideras la aferon tre grava & urja. (lau letero de Wolfgang al UEA: w.guenther.esperanto@web.de )

2009-08 **AVE-kunveno che Ekotur,** Svitavy/CZ
Verdeca okazajho organizita de Petro Chrdle. Dumtage ni migradis au bicikladis kun konatigho de la historio, kulturo kaj la naturo - vespere seminarieto: i.a AVE-kunveno (i.i. 3 AVE-anoj) kun la temo "Verda Ekonomio", kaj "Plastajhoj en la Akvaroj - videblaj kaj ne-videblaj dangheroj " (M.W.) Pri „arbaroj kaj la tutmonda klimato; arboj, kiuj utilas al re-arbarigo", kaj "kiom belas k bongustas flor-petaloj je nia manghado", (Normand Fleury); Ekoturismo (Petro Chrdle kaj Margit Turkova); liberecanaj, pacifismaj kantoj el la 60-aj jaroj) (Pavla Dvorakova kun gitaro kaj piano); Vizito de la Esperanto-Muzeo pri kio Svitavy famighas: www.svitavy.cz , & de la urba muzeo kie estas bonega ekspozicio pri Oskar Schindler kaj lia agado por savi pli ol mil judojn kontrau la naziista murdado. (Blanka )

**26 Jaroj: La Verdaj Partioj kaj Esperanto:**

**AVE estis fondita en 1984-03 en Liège** (Belgio) okaze de la unua renkontigho de la Europaj Verdaj Partioj. En 2010 AVE havas ch. 335 membrojn tutmonde, ch. 65 el ili estas verdaj partianoj. Ni fieretas pri la atingitaj sukcesoj, sed bezonatas konstanta kunagado de multaj homoj, char en la politiko validas nombroj.
Krom la tradukado nia chefa agado estas reciproke informi Esperantistojn pri la Verda Alternativo cele al daurigebla estonteco, kaj aliflanke ni montras al la Verduloj ke Esperanto kun siaj neutraleca hom-liga lingvo kaj malpeza sed bonkvalita strukturo optimale agordas al la Verda ideologio de paca kunvivado kaj ekologia dauropoveco.
AVE kunlaboras ekde **1984** kun la europaj Verdaj Partioj por respekti Esperanton kaj estimi ties potencialon; ni regule partoprenas la verdulajn kongresojn kaj prezentas Esperanton. Bonkvalita interpretado de la chefaj prelegoj i.a. en Esperanton okazis 1991 je la unua Europa Kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko. Dank' al la tutmondeco de Eo AVE-reprezentantoj partoprenas ankau je tutmondaj verdaj kongresoj (Canberra 2001, Nairobi '07, Sao Paulo '08)

Jen kaj jen ni sukcesis: Kelkaj resolucioj subtenis Esperanton. Sur pluraj retejoj de Verdaj Parti-Organizajhoj trovighas ligo al Esperanto, ekz-e al la tradukoj de la: Tutmonda Charto (Canberra)
www.globalgreens.info/globalcharter.php
Europa Programo (Ghenevo 2006) kaj la aktuala Manifesto 2009: www.europeangreens.eu
Krome AVE ofte tradukas gravajn tekstojn pri ekologio, verda ekonomio, sociala justeco, paco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj en Esperanton, ankau por NRO-oj, ekz-e BUND: vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/

Ghis 25% de la verdaj Euro-Parlamentanoj subtenis Esperanton dum la 90-aj jaroj - lau la Pirlot-Listo.
**1999**: Francio - Verda Partio notis Esperanton en siaj Europaj Programoj. La Verda Partio en Francio havas Eo-Komisionon: lesverts.fr/article.php3?id_article=645
Les Verts postulis en la EP-baloto-programo por 1999 sub "Lingva Politiko": 1. Esplori la uzadon de Esperanto kiel ponto-lingvo por la internacia komunikado. 2. Esplori la potencialon de Esperanto ene de EU. 3. Esperanto en lernejoj kiel elektebla lingvo.

**2002**: La germana Verda Partio **"Bündnis 90 / Die Grünen"** akceptis nian amendon por la Baza Programo (p.158): "Sprachen sind ein schützenswertes Kulturgut und sollen auf allen Ebenen Europas gepflegt werden: Von den Dialekten, regionalen und Minderheitensprachen sowie nationalen Sprachen bis hin zu den übernationalen Sprachen." En diskutlibro "grün 2020" trovighas sprita eseo de Britta Loose pri "Esperanto en Europo en 2020" en la germana. La

**germanaj junaj Verduloj prezentas Esperanton**
www.gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html
kaj paghon en la germana pri Esperanto:
www.gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html

**2008**: AVE organizis anglalingvan laborgrupon ene de la Europa Verda Somer-Universitato fine de Augusto en Frankfurt/Oder & Slubice. (pli en Aveno 33):
Finfine la ĉefaj rezultoj:
1-e. Inviti Verdan MEP-on al la Geremek-Grupo de la EP, por kune puŝi la rolon de Esperanto en la lingvo-lernado (propedeutika utilo) kaj cele al eŭropa identeco.
2-e. Esperanto estas vivanta lingvo kun propra kulturo (originala kaj tradukita literaturo, teatro-verkoj, kantoj kaj kanzonoj, denaskaj parolantoj, pacema historio kaj lingva evoluo.
3-e. Postuli ke la Komitato por Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento mendu sciencan esploron pri la "Kontribuoj de Esperanto al la Inter-Kultura Dialogo".

**2009**: Por la **Europa Programo** la germanaj Verduloj akceptis la amendoproponon de AVE:
"Kulturelle Vielfalt ist lebendig und darf nicht auf reine Folklore oder den Namensschutz von Camembert, Feta und Halloumi reduziert werden. Basis und Ausdruck der kulturellen Vielfalt sind die Sprachen Europas – nicht nur Sprachen der Mehrheitsgesellschaften, sondern auch der Minderheiten sowie **Esperanto als internationale Sprache der Völkerverständigung**. Mehrsprachigkeit ist stark zu fördern."
Traduko: "Kultura multeco estas vivanta kaj oni ne rajtas redukti ghin al nura folkloro au al la protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, ... La bazo kaj esprimo de la kultura multeco estas la lingvoj de Europo, ne sole la lingvoj de la plimulto-socioj, sed ankau de la minoritatoj kaj krome Esperanto kiel internacia lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda."
www.gruene.de/fileadmin/user_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/

2009-06-07 Komento pri la **baloto por la Europa Parlamento**: La komuna frakcio de la Verduloj kaj Regionalistoj kun la sveda Pirato ricevis 55 seghojn: Esperantistoj en la EP: Reinhard Buetikofer (V) lernis E-on kiel lernanto; kaj Malgorzata Handzlik (PP) denove estas en la EP - gratulon al ambau. Chu aliaj ?

Elkoran dankon al tiuj kiuj agadis kaj vochonis por la Verduloj. AVE daurigos la kontakton kun niaj MEP-oj. Ni diskutos kiajn pashojn eblas proponi al la V/R/P-frakcio por antauenigi la rolon de Esperanto kiel dauripova, justa kaj demokrata solvo de la EU-Babela lingvoproblemo.
**Por havi realajn sukcesojn, necesas ke multe pli da esperantistoj agadas en Partioj au aliaj NRO-oj.**
Ni laueble kunlaboras kun EDE, kiu pushis E-on okaze de EP-balotoj; sed ghi – kaj la nova partio-provo Unu-Mondo for-tiras fortojn de nia agado.
Ekologio kaj Ekonomio.
Vidu ligojn al Esperanto:
www.greens-efa.org, www.globalgreens.info

## Ekologio kaj Ekonomio

### Energio, atomenergio

Fairplanet (justa planedo): Internacia kooperativo, kiu investas en regajneblajn energiojn en Europo kaj en evolughantaj landoj: (de, en) www.fairpla.net/

Ne-sekuraj novaj atomreaktoroj en Usono kaj Europo: www.newscientist.com/article/dn18219

100 Bonaj argumentoj kontrau la atomenergio: Tre ampleksa fakto-kolekto kun ligoj al la dokumentoj: (eo) www.verduloj.org , (de) 100-gute-gruende.de

**"Koshmaro atom-rubajho",** TV, ARTE 2009/10.
**Germanaj kaj francaj radioaktivaj uranio-rubajhoj estas transportataj al Sewersk, Siberio, Rusio.**
Temas pri malrichigita uranio-heksafluorido, kio estas toksa kaj ankau enhavas restajhon de radioaktiva uranio. Lau tiu informo la bareloj staradas je subchiela areo. Pli detale pri tio (en la germana TV):
tagesschau.de/atommuelldeutschland100.html
Ghis nun nek Francio nek Germanio havas solvon por eterne stokadi radioaktivan rubajhon.
(lau Bad. Zeitung, 2009-10-15, p.2 kaj Liberation ..)

**"Greenwash"** (verd-lavita propagando) metodoj por venkigi la atomenergion: (de)
vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/termine.php?year=2009&month=10

Je la **Manifestacio "Sortir du Nucleaire" en Colmar** 2009-10-03 partoprenis 3 esperantistoj; belega mezepoka urbeto, proksime de "mia" (mw) atom-centralo Fessenheim (FR). Ghi estas unu el la plej malnovaj en Francio, kaj oni jhus rekontrolas, chu ghi povus servi pliajn 10 jarojn. Krom la daura elsendado de radioaktivaj isotopoj, kaj de fendetoj en la reaktora vando, minacas termtremo en nia regiono kaj aviadila krasho. (fr) alsace.france3.fr/info/alsace/
**Atomenergio - Ne Dankon ! Finfine Malshalti !**
(fr) www.fermons-fessenheim.org/

Chefa manifestacio en Germanio okazis en Berlino, kaj ankau en aliaj urboj, por haltigi la atom-energion. En Berlino partoprenis pli ol 50.000 homoj kaj centoj da traktoroj el tiu regiono kie la registaro planas fari fin-stokejon por radioaktiva rubajho en Gorleben.

Eble vi povus aktivi je la Tutmonda **Ventoenergio-Tago, Junio-15**: Sperti la eblecojn de la ventoenergio kaj diskuti pri la temaro. www.globalwindday.de

Atomreaktoroj: ankau la la novaj estos sufiche sekuraj: www.newscientist.com/article/dn18219

Alternativa kurento: (de) www.naturstrom.de/ , (de) www.ews-schoenau.de/mitwissen.html

Diversaj informoj kiel shpari energion: (de) www.ews-schoenau.de/runterladen/energiesparen.html

Pozitive por P.R.Chinio: Oni ofte audas de katastrofoj en chinaj karbo-minejoj. Aliflanke ghis nun oni ne tre observis la **energio-efikan konstruadon**. Korupcio malhelpis pli bonan konstruadon. Nun oni klopodas konstrui pli bone por redukti la hejtadon en norda Chinio kaj ankau la malvarmigon dum la someroj. Ekz-e GTZ (germana teknika kunlaboro) subtenas tion. (de, en) www.gtz.de/de/index.htm

**Radioaktiva Cezio**, Cs-137, estis trovita en lignaj stangetoj (en: pellets) por hejti. Ili venis de Litovio al Italio, kaj la esploro okazis pro malbon-kvalita brulado. La kvanto da Cs-137 esti 40-obla de la permesata valoro. Kaj la homoj estis avertitaj ne uzi la cindron de tiu lignajho sen kontrolo pri radioaktiveco. La ligno-cindro utilus por la ghardeno pro la mineraloj. Litovio ankau estis poluita de la radioaktiva pluvo post la katastrofo de Chernobil. Sed eble parto de la ligno ne venis el Litovio ? (lau la jhurnalo "neue energie", 07/2009, p. 93)

**2009-08-06: Ni ne forgesu la atombombojn sur Hiroshima kaj Nagasaki.**
Nur la tutmonda plena neniigo de la atom-arsenalo povas eviti duan fojon. Ankau katastrofoj kiel tiu en Cheljabinsk-40 (1956/'57) kaj testeksplodoj venenigis grandajn areojn kaj la tutan mondon per radioaktivaj isotopoj (Pu, Sr, Cs, J, ...) . Por multaj homoj, bestoj kaj plantoj tio signifis rapidan morton, au malrapidan mortadon.
2009-07-03 **Francio importas kurenton** dum Julio el Britio (1000 MW, egalas al ch. 1 atomcentralo (AC)). Pro la varmego multaj enlandaj atomreaktoroj devis esti malshaltataj. 14 el la 19 AC-oj uzas river-akvon, kaj la permeso estas limigta al maksimuma antau-uza akvo-temperaturo de 24 °C. EdF diris ke la import-bezono dum la somero estos ghis 8 GW (la elektro-konsumon de Parizo). (R.Pagnamenta, Energy & Environment)
Kom-oj AVE/mw: Francio somere ankau importas kurenton el Germanio. Unu el la kauzoj estas la klimate ne-oportunaj konstruajhoj, kiuj bezonas kuren-ton por malvarmigi. /Benno: Nur per samtempa mal-shalto de karbon- kaj atomcentraloj en Europo homoj konscios pri la urgha neceso de novaj energifontoj.

**Uranio** - jam la ekspluatado kauzas malsanojn: Amplekse en jhurnalo "natur und kosmos" Junio 2009: Dokumenta filmo: nukingtheclimate.com/ www.nuclear-free.com/
Energia repago (amortizigho) de regenerativaj energioj, averaghe bezonita por ghia produktado: Vento-generatoroj: duona jaro. Fotovoltaiko inter 2 - 5 jaroj. La vivodauro de tiuj instalajhoj estas pli ol 20 jaroj; do, entute granda gajno da energio. Sed alia afero estas la financa repago de la investita sumo: ghi estas pli longa kaj ege dependas de la prezo por la energio. Al Gore: (en, de) cleanenergy-project.com

**Ekologio & Kemio & Teknologio**

**Nano-materialo**: promesas novajn efektojn, ni sekvu la aferon. Uzado en manghajhoj au kosmetikajhoj estas dubinda, char povas okazi simile kiel je Asbesto (kancero montrighis nur 20 jarojn poste).
Uzado en fiksitaj materialoj eble plibonigas pli ol ghi damaghas.
Registro pri emisio kaj prilaboro de poluajhoj (angle: Pollutant Release and Transfer Register ).
Temas pri firmaoj, uzinoj grandaj bestobredejoj, klariginstalajhoj. Prezentata de la ministerio pri la medio en Germanio - pere de "Links" vi atingos aliajn landojn: www.prtr.bund.de (taz 2009-06-06 p.8)

**Gruzo-ekspluatado** el riveroj:
Monique Juy demandis chu la ekspluatado de la riveraj gruzoj estas permesata en Italujo?
Rekta respondo: Jes, bedaurinde!!!: oni donas teritoriajn koncesiojn dum difinitaj jaroj.
En Italio, principe kaj ghenerale validas (ankorau!) la legho pri hidraulikaj verkoj 25.7.1904, numero 523, kies artikolo 97 antauvidas, ke oni povas eltiri shtonajn materialojn (inter kiuj trovighas gruzo) nur post speciala rajtigo kaj lau la preskribitaj kondichoj. Oni kalkulas, ke nur 10 procentoj el la eltirita gruzo estas rajtigitaj, dum 90 procentoj estas eltiritaj kashe au kun la shajna pravigo, ke oni celas purigon de la riverujo por eviti inundojn; Antonio De Salvo (jughisto)

2009-05-12 **Elektrosmogo** en EU - danghero ankorau tro granda. La EP ja decidis la principon de antauzorgo, sed ili prokrastas la enkondukon de pli sekuraj limvaloroj per enkonduko de komitato kiu kontrolu chu la valoroj, enkondukitaj en 1999 de la EU konsilio de la mininstroj, estas akcepteblaj. La lim-valoroj estas diverse altaj en la diversaj EU-shtatoj kaj lau la principo "Plej Bone" oni povus preni ekz-e tiun de Luksemburgo kiu estas malpli alta je faktoro 14. Pli pri tio de Hiltrud Breyer, germana verda (eksa) MEP: www.hiltrud-breyer.eu/hbreyer/fe/pub/de/dct/491

**Ekologio & biologio & akvo & grundo & agrikulturo & GMO & klimato**

Koncize pri **naturprotektado** kun ret-ligoj:
Pri protektaj agroj (de/en): www.schutzaecker.de/
Germana Federacia oficejo por la protekto de la naturo - kun internaciaj ligoj, Rugha Listo
(de, ..): www.bfn.de
Austra NRO por reteni la diversecon de la naturaj plantoj, disdono de semoj
(de, en): www.arche-noah.at/etomite/
Abelbredistoj favoras florantajn pejzaghojn
(de): bluehende-landschaft.de/
Konservi la diversecojn de la bredataj plantoj: www.nutzpflanzenvielfalt.de/
Jhurnalo de la bio-vendejoj - granda ligolisto
(de): schrot-und-korn.de/links/

**Agrokulturo sen plugado** altigas la humuson kaj akvo-tenadon en la grundo. Temas pri pozitivaj rezultoj de esploroj en Svisio far Paul Maeder (FIBL); fakte oni plugetas ghis 5 cm. www.fibl.org
Esplorinstituto por **Biologia Agrikulturo**:
La oficiala Raporto pri la Grundo-Protekto de la germana ministerio montras la dangherojn por la

grundo, kio ankau havas sekvojn por la klimato: troa nutrado (produktas N2O - "ridiga-gaso"), manko da humuso pro erozio kaj ne-kovrita grundo, kio krome malpurigas la riverojn. NABU postulas pli fortajn limigojn, kiun la registaron timas pro malfacila kontrolo. (J. Maurin, taz, 2009-01-05p4 & 04-09p8)
Naturprotekta NRO: (de,en) www.nabu.de

**Klimato-Shangho**: Argentinio shanghis la klimaton pere de forhakado de grandaj arbaroj por planti soj-fabojn (GMO), kaj ankau la areo de herbejoj (la Pampa Humeda) kie estis bovoj nun estas agroj.
La grundo solidighas kaj la pluvo ne plu eniras en la grundon tiom kiel antaue (inundoj post pluvo). Eble adicie venas la perioda klmiato-shangho inter El Ninjo kaj La Ninja por akrigi la situacion. Nun oni raportas ke jam miliono da bovoj pereis pro manko da akvo. Estus saghe re-shanghi tian politikon, kaj eble manghi malpli da bov-viando, kaj redukti la sojfabo-plantadon. (J. Vogt, taz, 2009-03-11), kaj (es) fundapaz.org.ar

**Bajkal-Lago** & Klimatoshangho
La tutmonde altigantaj temperaturoj sekvas ke ankau je la Bajkal-Lago estas malpli longa periodo da frosto. Sekve de tio la diatomeoj (siliko-algoj) kiu jam floras sub la glacio de la lago havas malpli longan tempon por tiu evoluo. Sekve de tio la nutrajho-cheno - fishoj kaj finfine la Bajkal-fokoj - havos problemojn. La fokoj bezonas la glacion ankau por havi idojn. Krome la kvalito de la lago, kiu enhavas 20% de la tutmonda trinkakvo, estas sub premo de la industrio(aparte de la paper-uzino en la sudo). (lau BioScience: Wellesley College (US, www.wellesley.edu ) kaj Univ-o Irkutsk, kiu proksimas al la lago: olddesign.isu.ru .
Vizitinda ankau (en, ru ): www.baikal.ru
(lau J. Pernsteiner, pressetext.austria, 2009-05-04)

2009-12-15 Senrezulta **Klimato-Pinto** en Kopenhago.

Kunlaboro de regionoj de la grandaj **rivero-sistemoj:**
ghenerale - International Water Association:
www.iwahq.org
International Commission for the Protection of the Danube River: www.icpdr.org
Nile Basin Initiative (NBI) & Nile Equatorial Lakes:
nelsap.nilebasin.org
Orange-Senqu Rivero Komisiono (ORASECOM) kon-silas la membro shtatojn (Bocvano, Lesoto, Namibio kaj Sud-Afriko), pri la evoluo kaj uzado de riveraj regionoj: ipsnews.net/news.asp?idnews=48505

2009-09 Bundanun, urbeto en la sudaj Altlandoj de Nova Sud-Kimrujo en Aŭstralio (angle Wingecarribee Shire) faris rimarkindan paŝon en la batalo por pli bona medio. Post du monatoj estos malpermesite tie vendi botelakvon. En la vilaĝo anstataŭe staros du akvo-pumpiloj. La agado samtempe estas protesto de malgranda komunumo kontraŭ grandaj kompanioj, kiaj Norlex kaj Coca Cola (Neverfail kaj Mount Franklin), kiuj forpumpas grundakvon de sub la piedoj de la loĝantoj de Bundanun por poste vendi ĝin al ili.
(nl) goestingingroen.be/homeDetail.php?blogID=426
(Leo de cooman & philippe.mingels@groen.be)

Savi la **pluvarbarojn**: la homaro chiam tendencas uzi pli&pli de la naturaj areoj. Aparte endangherita estas la pluvarbaroj, kiuj valoras tutmonde por la klimato, akvo-tenado, kiel hejmo por bestoj kaj biologia diverseco. Sojo, bovinoj kaj oleo-palmoj por energio estas la plej gravaj kauzoj, kaj jen kelkaj internaciaj ligoj rilate al la savado de la pluvarbaroj:
(de) regenwald.org/links.php?rub=3

La **verda miraklo** en la dezerta Ordos-regiono: Yin Yuzhen kun shia edzo vivante en dezerta oazeto - en la Interna Mongolio, ene la la grandega kurbo de la Flava Rivero - dum 35 jaroj sukcesis allogi la pluvon en la dezerton. Ili plantis arbojn de multaj diversaj specoj, kaj studis kiuj pli taugas. Tiel ili plibonigas la grundon kaj la mikro-klimaton. En la ombro de la arboj ili ech plantas legomojn. Shi estas unu el la 1000 paco-virinoj. Kontraste al la china registaro, kiu ja ankau plantigis arbarojn kontrau la dezertigo, shi ne uzas tiajn arbojn kiuj ege suchas multe da akvo kaj nutrajhoj - kaj eble nur taugas por produkti paperon.
(de, en,es) www.1000peacewomen.org/index.php

2009-08-15 **Fulgo voras glacherojn**
Aparte la fulgo de dizelo kaj karbo-bruligado, sed ankau de la forbruligo de arbaroj kauzas plirapidigon de la fandigho de glacheroj, char la nigraj fulgeroj kolektas la varmon de la suno. Pro tio ankau la ghenerala vaporigho altighas kaj shanghas la kreadon de nuboj. Do, en la Himalajo pli rapide fandighas la glacheroj, kun pli da inundoj kaj iam malpli da akvo dum la somero, kiam la glacheroj reduktighis. La pli rapida fandigho de la glacio-tavolo en la Arkto-regiono jam kauzis ke kreighis nova vojo por shipoj chirkau la Norda Poluso; kaj la aktaj ursoj k.a. mamuloj havadas ekzisto-problemojn, char ili bezonas la glaci-tavolojn sur la maro. www.sonnenseite.com & www.duh.de/

2009-08-15 Je la bordo de la Indus-Deltao estis plantitaj 541.176 **mongrovo-arbidoj** en areo de 325 hektaroj dum unu tago (por eniri la rekord-libron). Sed pli grave: tiel Pakistano, kunlaborante kun WWF, unue subtenas la fishojn, char mangrovo-radikoj donas la plej bonan lulilon por fishidoj; due ghi preventas kontrau ondo-inundegoj de la maro, char la mangrovoj malfortigas la ondojn; kaj trie mildigas la klimaton.
www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Pakistan-500.000+Baeume+an+einem+Tag,6,a13522.html

2009-08-16 La norda parto de la **Aral-Maro** trovighas en Kasahhio; kiu zorgis ke la Syr Darja restu fluanta rivero, kaj dank al barajho la akvo ne fluas en la sekigitan sudan parton de la Aralo.
Sed la diktaturo en Uzbekio fakte ne interesighis fari la taugajn pashojn kaj kunlabori kun eksterlandaj NRO-oj. Satelita-foto: www.pressetext.at, sonnenseite.com/Aktuelle+News,Ostteil+des+Aralsees+vor+voelliger+Austrocknung,6,a13533.html

La maldekstra parto de la satelita bildo montras la staton en 2006. La Amu Darja delonge ne plu atingas la maron, sed estas haltita per barajho proksime de Nukus. La insuleto Wozrozhdenja, kie la Sovet-Unio

praktikis ege dangherajn militajn esplorojn pere de bakterioj kaj virusoj, ighis duon-insulo; sekve de tio pli facile eblas ke la malsanoj venos al la mondo.
La regiono Karakalpakio estas en katastrofa situacio: la viv-atendo reduktighis de 64 al 51 jaroj. Salo miksita kun pesticidoj pro kotono, trovighas en la aero kaj la vento transportas ghin al la plej altaj montoj, kie glacheroj pli rapide degelas - dume ili ekzistas. eco.uz

2009-05-16 **Aziaj krabro** (vespa velutina) endangherigas la abelojn en suda Europo: **Averto de J-M Cash:** Hodiau en radio mi audis intervjuon de insektfakulo (entomologiisto): Li konfirmis, ke kelkaj kaptiloj dismetitaj ne kapablas malaperigi ghin, sed mortigos ankau multajn aliajn insektojn. Chu ekstermi ilin ? Chiujare aperas multaj neinvititaj specioj, oni unue devas pristudi la adaptighon kaj evoluon.
(de) www.hymenoptera.de/html/velutina

**Bio-Patentoj**: Europaj NRO-oj transdonis protestleterojn al la Europa Patent-Oficejo por bari la patentojn al vivantajho. Aktuale temas pri deziro de firmao al europa patento pri aparta geno en porkoj, kiu garantias pli rapidan kreskadon. La NRO-oj plendas ke la patento monopoligus la tutan bredado-evoluon je porkoj (kaj eble aliaj bred-bestoj).
La Europa-Patentoficejo financighas de patent-kotizoj, kio malhelpas vere kritikan rigardon.

Germanaj NRO-oj kaj civitanoj konvinkis la agrarministrinon Aigner malpermesi la semadon de **GMO-majzo** MON810. Tiu gen-teknike manipulita speco de majzo produktas la (naturan) venenon Bt (botulinus) kiu estas venena kontrau insektoj. Ties celo ja estas mortigi papilieton kiu damaghas al la majzo. Jen la argumentoj por malpermesi ghian uzadon:
1. La polenoj de tia GMO-majzo mortigas ankau aliajn insektojn (abeloj, papilioj) se ili manghas ghin.
2. Ghies genetika heredajo povas aliri pere de flugantaj polenoj al alia varianto de majzo.
3. Necesas esplori la sano-riskojn, sendepende.
4. La monopola situacio de Monsanto, kiu premas la kamparanojn.
(2009-04-15, kaj Sennaciulo 2010 05/06 pri GMO.

**Ekologio & Manghado & Vivo**

**Manghi konscience** "Slow Food", manghi konscience
www.slowfood.de/youth_food_movement/
2009-11-14 Nov-Jorko: La mangh-kooperantivo en kvartalo Park Slope de Novjorko estas eble la plej granda mangh-kooperativo en la mondo. 15.000 membroj laboras tie unu tagon monate kaj achetas tie pli ofte. Multaj estas vegetaranoj. Ghi koncentrighas pri ekologiaj temoj (i.a. per gazeto papera kaj reta), same kiel ghi interesighas pri vegetarismo & bickiklado: foodcoop.com , www.esperanto-nyc.org
(Neil Blonstein <neil_nachum@yahoo.com> )

**Vegetara manghado kontrau la klimata krizo:**
En Gent, Belgio oni decidis ke Jhaudo estos vegetara tago por publikaj manghejoj kaj ankau la restoracioj havu almenau unu vegetaran pladon. Krome Gent estas urbo kun 94 vegetaraj restauracioj, kaj haveblas mapo kie ili trovighas. La ideo venis de la Etika Vegetara Asocio de Flandrio. Mi rememoras la bonan vegetaran manghajhon okaze de la **UK en Zagrebo**.

**Ekologio & ekonomio:**
Komisiono pri la kreado de pli konvena ekonomia-ekologia-sociala indico:
www.stiglitz-sen-fitoussi.fr/en/index.htm

Pli bone eluzi la resursojn - TU-Berlin esploras ripari kaj plibonigi anstatau forjheti aparatojn ktp.
(de) www.besser-nutzen.de
ekz-e: reuzi komputilojn - riparejoj por komputiloj, anstatau chiam acheti novajn; kun adresoj de firmaoj:
(de) www.reuse-berlin.de/

**Wael al Mahdi blogas pri Daurigeblo**:
waelalmahdi.com/?p=187&cpage=1#comment-37

**Respondecaj Komunumoj** kiuj agas rilate la klimata shanghigho kaj la fosiliaj fueloj.
(en) www.transitiontowns.org/
Tutmonda urba partnereco pri ekologio, energio, kulturo: (de,en,fr) soned.de

Malkresko - pli bone ol daura kreskado: Ilia ideo: ni devas serchi ekonomian vojon kiu ne dependas de daura kreskado. Kelkaj Verduloj akceptis la tezon.
(fr) www.ladecroissance.net/

Ekonomia kreskado-limo je **1,8%**, pro la klimato kaj limigitaj resursoj. Ekonomisto, St. Gallen, kiu favoras ekologian impostoreformon:
de.wikipedia.org/wiki/Hans_Christoph_Binswanger

**Bhutan** survojas al **nacia felicho** - kontraste al la kutima brutto-nacia-produkto. Ili evoluis 9 temojn kiuj necesas por atingi kaj teni la felichon: ekologio, kulturo, registaro kiu bone regadas, edukado kaj klerigo, sano, vivantaj komunumoj, homeca tempouzado, psika bonfarto kaj vivnivelo. ( taz, 2009-12-06, p.19)

**Ekologio & socio & paco & religio:**

2009-11: P.R. **Chinio / Tibeto**: Detruo de la stabileco de la tibeta ekosistemo. Malnov-tipa socialisma eksperimento detruas la tibetan kulturon.

Honora Rememoro al la ekzekutitoj (pro bruligo) Lobsang Gyaltsen, Loyak, Penkyi kaj "sen-noma" homo kiuj estis mortigitaj en P.R.Chinio (2009-10-20) 2 tagojn post la brila prezentado de la china libro-kulturo okaze de la germana libro-foiro en Frankfurto. Ili partoprenis je la protestoj okaze de la Olimpikaj Ludoj en Pekino 2008.

Fakte: La tibeta altebenajho (inter 4 - 5.000 metroj super la maro) estas ne tre stabila pro la klimataj kondichoj. La stepo plej bone estas uzata per nomadismo, tiel ke la nombro da besto kaj la tempo de restado de la gregoj je unu loko estas mallonge. Tiel la grundo restas surloke kaj la dauripoveco estas

garantiata. Pro ia - supozeble politika - kauzo oni devigas la homojn cedi la nomadisman vivon, kaj loghi en betonitaj domoj, al kiuj ili ne estas adaptitaj. Simila deviga setligo (detruo de vilaghoj) okazis en Romanio sub la diktatoro !
En la alta regiono de **Tibeto** kun severa kaj seka klimato, kie la sola greno estas hordeo, bestobredado bezonas nomadumadon. Sed setligitaj homoj estas pli facile kontroleblaj. La plano estas ke la nomadismo reduktighu je 80%
AVE-anoj verkis detalan artikolon pri la iama sen-arbarigo, kiu estis publikigita en la china Esperanto-jhurnalo: Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, 1996/3, p. 30-34 (cn, eo) kaj verduloj.org/tib_senarba.htm
El Tibeto, la Okcidenta Trezorejo "Xi-Zang", Chinio ekspluatas diversajn ercojn plej ofte en subchielaj minejoj, kaj el la montoj de la ne-uzebla grundo venas toksaj mineraloj en la akvon kaj en la aeron. Natura medio kaj sano malgravas homoj (kaj bestoj ?) en la proksimeco malsanighas.
Formale Chinio sindevigis observi la regulojn de "**Extractive Transparency**" - www.eiti.org

El Tibeto devenas **5 el la plej gravaj riveroj** de Azio, kies akvo estas malpurigata tiamaniere. Homoj en 11 landoj interesighas pri la kvalito de iliaj riveroj.
(de,en): www.tibet-initiative.de

Kaj jen eldiro el ampleksa artikolo de **China Radio Internacia pri la evoluo de Tibeto:**
"... ni certe povas krei evoluan vojon kun ĉinaj trajtoj kaj tibetaj karakterizoj kaj konstrui novan socialisman Tibeton, pli prosperan, pli riĉan kaj pli belan."
(necesus demandi la tibetan etnon chu ili kunsentas):
esperanto.cri.cn/621/2009/10/23/1s104446.htm

Sed ne nur temas pri tibetanoj - ankau homoj el la **han-etno** riskas malliberejon, se ili "ne kondutas agrable". Homoj kiuj volis protesti pro maljusta pritrakto flanke de firmaoj au lokaj autoritatoj ofte estas forrabitaj kaj trovighas en t.n. "**Nigraj Malliberejoj**" (cn: hei yu) por rezigni la plendon.
(Lau Human Rights Watch kaj "taz" 2009-11-13 p.1+3)

Mem-entreprenantaj malrichaj virinoj en Hindio fondis la asocion SEWA (self employed womens ass.). Ili protestas kontrau la ekspluatado de virinoj en la ne-regula labormerkato, kaj postulas salajro-minimumon por chiaj laboroj. Iliaj entreprenetoj laboras kune kaj tiel havas rektan aliron al la merkato, kaj vivas pli bone kaj sekure. (en) www.sewa.org/

**Paco en Afriko** - kunsidi por redukti la konfliktojn, moderi je unuopaj lokoj kie povus okazi konfliktoj, ekz-e je akvo-putoj, lernejo, kaj je la limoj. Tion instigis s-ino Dekha Abdi el Somalio je la limo al Kenio. Shi opinias, ke ankau internaciaj problemoj estus moderigeblaj, kiel ekz-e la klimata problemo, aparte pere de la shangho de komunumaj politikoj. Shi investis la monon de shia Alternativa Nobelpremio (2007) en Paco-Universitaton, kie oni instruas moderi konflikt-partiojn.

**Unitarian** Universalist Esperanto Network: Por atingi la celon de la 6-a Principo pri mondkomunumo kun justeco pri komunikado per Esperanto.
www.grupoamikema.org/UUEN.html

**Laicismo:** pri blasfemio-legho: hpd.de/node/8265

**Homaj Rajtoj kaj Socialaj aferoj**

Europa Konsilio - Minoritataj Lingvoj - nova eldono de la gazeto: ecml.at/gazette/gazette-15-E.htm

Nov-17: Internacia Tago de Studentoj: rememore al tiuj studentoj kiuj estis viktimoj de totalitarismaj reghimoj (aktuale: Irano, Kolombio, Belarusio). Okazis manifestacioj de studentoj en pluraj europaj landoj por plibonigi la instruo-situacion k.a.. (lau FYEG, Fed-o de Junaj Europaj Verduloj): www.fyeg.org/cms/

**UN-Konferenco kontrau Korupto** / por Travideblo:
transparency.de/Tabellarisches-Ranking.1526.0.html

Mireille Grosjean kaj japanaj samideanoj preparis retejon en pluraj lingvoj: **alvoko-al-mondpaco**.org
9 proponoj kiujn vi povas akcepti au preterlasi.
La Tutmonda Marshado por Paco por homoj, kiuj engaghighas por paco kaj senperforto:
www.theworldmarch.org/index.php?lang=epo

**Mortpuno:** en Usono intertempe estas liberigitaj multaj (pli ol 100) mortpunitaj senkulpuloj dank' al DNA-analizo. Espereble Usono baldau abolicios la mortpunon entute, kaj ankau Chinio, Irano, Japanio ...
Kaj **ni salutas nian amikon N.I.Sekvoyah** kiu pro la malegaleca ne-justa pun-sistemo estas mortpunita kaj malliberigita preskau 20 jarojn. Espereble li ricevos la shancon al vere homeca kaj justa proceso.
**Rusio** aboliciis la mortpunon, sed tamen aparte la vivo de jhurnalistoj kaj defendantoj de la Homaj Rajtoj estas minacataj - mortpafigi homon ja egalas al mortpuno (ech sen (justa) proceso). Aparte pro tio, ke la registaro fakte ne vere kontrauas tiun metodon.

**Irano:** 2009-06-14 Okazis manifestacioj en Irano, char oni ne fidas al la tro bona balotoresulto (62%) por la nuna prezidento Ahmadinedshad. La duaranga en la baloto, Musavi, postulis ripeti la baloton. Jam la ekskludo de virinoj el la kandidateco kontrauas la Homajn Rajtojn. Tamen li estas oficialigita. Peticio por haltigi la krimojn de la irana registaro
La Granda Ajatollao Hussein Ali Montaseri mortis, unu el la elstaraj kritikantoj de la nuna sistemo, konstruita sur balot-fraudo kaj perforto kontrau kritikantoj. Jam estis ekzekutitaj 79 personoj kiuj partoprenis la manifestaciojn, milaj aliaj terture perfortitaj. La ekonomio malbone funkcias. Kiom longe ?
2009-07-25 Irana Demokratio - Tutmonda Agado-tago. Solidareco-agadoj kun la irana popolo okazis en pli ol 60 urboj tutmonde:
Eminentaj eklezіuloj en Irano malakceptis la falsigon de la elekto-rezultoj, kaj volis referendumon, chu la irana popolo akceptas la tiel elektitan prezidenton.
(lau "taz", 2009-07-23, p. 4)

**Kelkaj retejoj pri Irano:**
(en, ir): petitioniran.com/?page=petition&pid=YLT5392
(en) www.united4iran.org/locations
(en,..) iran.whyweprotest.net/
(eo) www.ipernity.com/blog/reza.torabi
(eo) mas-eo.org/article360.html

2009-06-19 La vendreda parolado de Khamenei en la universitato montris, ke li ne intencas trovi la veron, sed defendi tiun kiu pli agordas kun la sistemo. Li ech diris ke dubi, ke la balotorezulto havas erarojn, estas kontrau-islama. Li malpermesis manifestacion dum sabato. Por eviti stultan oferadon de homoj necesus daura "civitana malobeemo", kion jam montras la blogo de Reza.

Rekte el Irano (vidu nian retejon - Aveno 34 - HR)
1- Ekde la 15a oni okazigas "silentan manifestacion" sur la ĉefstratoj de Tehrano kaj ...

Ni lernis el la historio (SU, Romanio, Nazi-Germanio, Rugha Kambogho kaj Chinio, Usono (en Vjetnamio, Peru, ktp).. ) ke tiaj sistemoj ne dauras eterne. Sed bedaurinde por la honestaj nuntempaj homoj en tiuj landoj ghi signifas katastrofo.

La registaro de **P.R.Chinio** - malgrau ekonomie forta - ankorau nuntempe ne akceptas kritikon, ech ne konstruivan - ili preferas ke lernantoj pereas je ter-tremoj pro lernej-konstruado lau fusha maniero, kashita pere de korupcio, k.s.. LIU Xiaobo nun estas kondamnita al 11 jaroj pro "subfosado de la registara forto" , chefe char li subskribis la "Charton 08" (rememore al la chehha "Charto 77", temas pri 19 postuloj por modernigi P.R.Chinion.
(div-aj lingvoj) de.wikipedia.org/wiki/Charta_08
"Charta 08" (en) www.nybooks.com/articles/22210
(Bad. Ztg., 2009-12-24, p.5, & "taz" 2009-12-24, p.12)

P.R.Chinio rezignas partopreni la film-festivalon en Australio, char tie estos montrita ankau filmo pri Rebiya Kadeer, "patrino de la ujgura autonomio" kiu kritikas la "kulturan popol-murdon" . Estus pli saghe malferme diskuti tiajn pri-etnajn aferojn, anstatau bari chian diskuton. Ech la pilgrimado de la ujguroj al Mekka estas kanalizita de la shtato, kaj pli multekosta. Statistike la ne-han etnoj malpli bonshancis de la bona ekonomia evoluo de Chinio.
(lau B. Bartsch, Badische Zeitung, 2009-07-23, p.4)
Okazis protest-manifestacio pro la mortigo de 2 ujguroj en Urumqi (PRCh). Pro tiuj manifestacioj estis mortigitaj (pli ol) 150 homoj kaj malliberigitaj pli ol 1000. Jam loghas pli da han-etnuloj ol ujguroj en Orienta Turkestano = XinJiang. (lau ARD, 2009-07-07)

Certe ankau en multaj **aliaj landoj** okazas agoj de la registaro kaj de aliaj kiuj kontrauas la Homajn Rajtojn. Sed kutime libera kaj respondeca jhurnalismo rapide malkashas la aferojn.

2009-11-19 La 3 **EU**-reprezentantoj estas elektitaj:
- EU-Prezidanto: la belga Hermann Van Rompuy (62), kun-verkinto de federista manifesto pri Europo (moton, himnon, standardon kaj europan tagon).
- EU-Alta Reprezentanto por Ekstera Politiko: la angla Catherine Ashton (53).
- Ghenerala Sekretario de la Europa Konsilio (de la ministroj): denove la franco Pierre de Boisson, shlosila pozicio se temas pri projektoj kaj kompromisoj.

2009-11-13 EU: La **Lisbona traktato**, konfirmita finfine de chiuj 27 EU membroshtatoj; ghi ekfunkciigas de 2010-01, la 3 EU-Traktatojn:
- TEU=Traktato pri EU (la fundamenta traktato de EU)
- TFEU=Traktato pri la Funkciado de EU (la aplika traktato de TEU)
- ChFR=Charto de Fundamentaj Rajtoj
eo.wikipedia.org/wiki/Traktato_de_Lisbono
TEU kaj TFEU (de): eur-lex.europa.eu/JOHtml.do?uri=OJ:C:2008:115:SOM:DE:HTML
(eo) europo.free.fr/konstitucio.htm
sed nur de la art. 61 ghis la art. 114
Diversaj europaj temoj:
Chu daure validas la Euratom-traktato ? Jes, sed ghi bezonas shanghon.
- Montanunio: TEU art. 3, TFEU art. 119-126, 134,135
- pri medio kaj klimataj shanghoj: TFEU art. 191-193.
(J-K Rinaldo el Padova.IT.EU kaj mw)

**Rusio** - emo respekti la Homajn Rajtojn kaj la Jurshtatecon altighas: Individuaj policistoj protestas pro maljusteco. Ekz-e en la respubliko Komi okazis incendio, la polico arestis du homojn, ili estis kon-damnitaj en rapida proceso al viv-longa malliberejo. La vic-prokuroro G. Chekalin esploris la aferon kaj trovis, ke ili estis ne-kulpaj, sed ke la raportoj de la polico estis fikciaj; li turnighis al la prokuroro - sed tiu malshatis la intervenon kaj maldungigis la vic-pro-kuroron (antau du jaroj). Dank' al la Nova Jurshtata Politiko de la prezidento, li kuraghighis kaj apelaciis al Medwedev per video-mesagho en la interreto, por finfine malaresti la nekulpulojn.
(lau KH Donath, taz, 2009-11-17, p.11)
La murdo al Anna Politkovskaja estas denove en la tribunalo, sed denove oni rezignis pri funda esploro. La pafisto ja vershajne laboris lau mendo. Anna estas nur ekzemplo de pluraj murditaj jhurnalistoj en RU.

En la parolado de la Prezidento de Rusio, Medwedev, io mankis: Lau la analisto David Clark (The Times, 2009-11-13), ankorau estas manketo inter la retoriko kaj la agado de la moderniga programo. Krome, la "dua manifestacia proceso kontrau Mikhail Khodor-kovsky" subfosas lian aserton promocii la jurshtaton.

Rusio - denove pri la proceso kontrau M.B. **Khodorkovsky** - kiu dauradas; supozeble tiom longe ghis Putin ne plu interesighas je politiko ! Jen interese leginda leterintershangho kun la verkistino Lyudmila Ulickaya: www.khodorkovskycenter.com/news-resources/stories/khodorkovsky-s-correspondence-russian-novelist-lyudmila-ulitskaya
2009-07-03 **Komuna mocio** de la parlamentanoj de plimulto de la partioj (CDU/CSU, SPD, FDP, Verduloj, sen la Maldekstruloj) en la federacia parlamento de Germanio plendas direkte al la prezidento de Rusio,

sekvi jur-shtatajn metodojn en la kazo de Mihhail Khodorkovski (chefo de la neniigita konzerno Jukos en Rusio). www.khodorkovskycenter.com/

2009-10-01 **P.R. Chinio** festas la 60-jarighon de la shtatigho: Duonan gratulon al la lando, kiu dank al Mao Dse Dong sukcesis liberighi el fremda sklaveco, kaj post malfacila vojo nun trovighas inter la plej povaj shtatoj. Sed: Kondolenco indas al tiuj etnoj kiuj ne kun-festas (tibetanoj, ujguroj kaj eble aliaj) kaj krome al tiuj homoj de la han-etno kiuj ne povas kun-festi char ili au estas politikaj malliberuloj au verkistoj kiuj ne rajtas publikigi siajn verkojn en la PRCh, la gasto-lando de la germana librofoiro en Frankfurt 2009. Je la publika prezento (simpozio) ankau venis Dai Qing kaj Bei Ling, **disidentoj** en Chinio, kiuj estis invititaj de la germana PEN-Klubo (de verkistoj), sed ne ricevis la permeson partopreni flanke de la china registaro. Pro ilia parolado la china delegacio forlasis la kun-venon, malgrau la fakto ke Dai Qing ech laudis certajn plibonigojn rilate la opinio-liberecon. (HR, 2009-09-12)

En **Saudi-Arabio** estis malfermita la Regho Abdullah **Universitato** por Scienco kaj Teknologio (KAUST) - aparte nova afero: ambau seksoj studas kune, kaj ne ekzistas devo porti la kaptukon. Plimulto estas eksterlandanoj. (lau "taz", 2009-09-24, p.17)
Kontraste al tio: en **Irano** pli severa estas la "islamigo" de chiuj universitatoj; ekz-e per 40%-a kvoto por Basidsh-milicistoj. (lau "taz", 2009-09-23, P.11)

2009-09-08 Rehabilitado de "milito-perfiduloj" en **Germanio**: Iom post iom okazas la prilaboro de la dua mond-milito kaj de la nazia epoko en Germanio.
Jam 2002 - kiam la Verduloj estis en koalicio kun la SPD - la federacia parlamento korektis la nazi-epokan leghon kaj tiamaniere donis rehabilitadon al milit-dizertintoj. Nun - dank' al esploroj de milit-historiisto Wolfram Wette (k.a.) kaj post iniciato de la Maldekstra Partio - finfine chiuj partioj subtenis la rehabilitadon de homoj kiuj estis mort-kondamnitaj kiel "milito-perfiduloj" pere de la nazia militara-justico. Tio ne plu helpas al tiuj 30.000 plejmulte ekzekutitaj, sed fakte al la familioj, kiuj re-ricevas la honoron de sia familiano; kaj eble ankau subtenas la leghdonon ghenerale pri tio, kio okazas sub fiaj registaroj.
Federacia Parlamento de Germanio:
Legh-propono de 2009-07-01: Drucksache 16/13654
Parolado de Wolfgang Wieland: gruene-bundestag.de

Eŭropa Alianco de Iniciatoj por **Aplikata Antroposofio** / ELIANT
Homa digno kaj individua evoluado estas kernaj valoroj de Eŭropa kulturo, al kies evoluo la iniciatoj de Rudolf Steiner pri aplikata antroposofio kontribuis dum pli ol 80 jaroj. Precipe en la fakoj de agrikulturo, edukado, edukado por specialaj bezonoj kaj medikamentoj evoluighis humanaj alproksimiĝoj de la plej alta kvalito, kaj trovis tutmondan agnoskon kaj estimon. La Alianca tasko estos akiri laŭleĝan sekurigon por tiaj iniciatoj kaj plu-evoluigi ilin kiel kontribuaĵo al la plua formado de Eŭropo: www.eliant.eu

Kiel en chiuj landoj, tiel ankau en **Rusio** estas mal-richaj familioj kun **leukemio**. Ech ankorau ne ekzistas en la granda Rusio datenaro de potencialaj donacintoj de sanaj medolo-cheloj. (en, de, ru) www.advita.ru

**Grenlando** ighis sendependa - gratulon - kaj dankon al la dana registaro ke tio efektivighis.
Ni deziras al la nova shtato bonan politikon en malfacilaj cirkonstancoj - indus verki resumon pri la lando kaj pri la nunaj problemoj.
Por pli bone kompreni tiun apartan regionon mi rekomendas la specialan kajeron de "**Norda Prismo**": de la jaro 1964 (?) numero dedichita al la grenlanda popolo: Naqitigaq una kalatdlinut pigitiparput !

2009-05-02 **Usono**: Barak Obama intertempe dejhorante kiel prezidento pli ol 100 tagojn, komencis multajn riparojn de la antaua politiko: subteni ne nur la bankojn sed ankau la homojn en la financa krizo, agnoski la klimato-shanghighon, malpermesi torturon, fini ne-legalajn - lau internacia legho - malliberejojn, pacigi Israelon kun la palestinanoj, paroli kun Irano ka, malprodukti la atombombojn tutmonde.
(Die Zeit, 2009-04-08, p.4)

La bulteno **Monda Solidareco** numero 97 estas de nun havebla je: globidar.org/solidareco/MS99EO.pdf

## AVE kun la Verdaj Partioj & Movado

AVEanoj tradukis tekstojn de la Verdaj Partioj en Esperanton: Libro de la Verduloj, Manifesto 2009, novajhleteroj pri la baloto-kampanjoj de la Europaj Verdaj Partioj por la EP.
Interese, la **Verdaj Partioj mencias Esperanton:**
La novajhletero #2 de la Europa Verda Partio menciis nian tradukon de #1 :
ESPERANTO "Pensu amplekse - vochdonu Verde"
See the EGP newsletter in Esperanto!
www.verduloj.org

Esperanto-Komisiono partoprenis la Somerajn Tagojn de Les Verts (2009): jde.lesverts.fr/
lesverts.fr/article.php3?id_article=4649 ,

2009-08-08: Post la **UK en Bjalistoko**:
Dum la AVE-kunveno multe oni parolis pri la aktuala krizo (finaca - au klimata ?) - certe ankau grava temo. Sed, mi ankorau ne legis pri la diskuto kion ni povus postuli de niaj denove/nov-elektitaj MEPoj en la EP. Ni devus kontakti ilin sendante gratul-leteron.

AVE/Manfred petas la polajn AVE-anojn informighi pri la polaj Verduloj: En eo.Vikipedio trovighas ilia enireja ret-pagho en Esperanto – la traduko estis petita de ilia vira parolisto D. Szwed: www.zieloni2004.pl/news.htm

**El blogo de pola verdulo Adam Ostolski:**
*Aparte menciinde lia raporto pri la vizito de AVE-anoj en ilia oficejo en Bjalistoko:*
".. Vendrede, ni ricevis neatendite viziton de José Antonio Vergara el Ĉilio kaj Mireille Grosjean, el Svislando, du Verdaj kamaradoj venintaj al Pollando

por ĉe-esti la Universalan Kongreson de Esperanto en Bjalistoko. Surprizas onin kiom proksimaj estas la idealoj de la Verduloj kaj tiuj de Esperanto, kiel lingvo konstruita ĉirkaŭ idealoj de paco kaj homa egaleco sen-rigarde al nacieco, kaj sur la Espero, esenca por ia ajn progresisma politiko. Mi sentas min honorata konatiĝante kun José Antonio kiu antaŭe estis aktivanta kontraŭ la reĝimo de Pinochet. Mi imagas kiom da kuraĝo tio postulis. Kaj mi admiras ke li daŭre batalas por tio por kio li batalis tiam. Estas alia speco de kuraĝo kiun ni – Verduloj – Socialistoj – Esperant-istoj bezonas nun en nia post-politika erao: la kuraĝo zorgi." Verkita de Adam Ostolski aktivulo de la Pola Verda Partio kaj membro de la redakcio de Krytyka Polityczna, maldekstrema magazino. greenvoicefrompoland.blogspot.com/2009/07/free-to-care.html (tradukis el la angla Michael Leibman)

2009-05-31, Herzberg, AVE-renkontigho okaze de la EEU-/GEA-Kongreso.
Partoprenis 14 e-istoj, inter ili 6 membroj de AVE, inter ili 2 novaj. Disdonita estis la kolekto da pozitivaj mencioj de Esperanto flanke de la Verdaj Partioj. M.W. prelegis pri Verda Ekonomio (chefe alternativaj energioj - laborlokoj, atomenergio-pado).

El letero de Emile Mas,
2) Kun Leo de Cooman, ni tradukis la gravajn tekstojn, de la reto "Sortir du nucléaire" pri atom bomboj kaj atom-energio . Vidu : dont-nuke-the-climate.org/
3) grava tutmonda marshado por la paco okazos ...
Ankaù tesktoj de tiu agado estas tradukitaj en Esperanton: theworldmarch.org
Peto al chiuj gesamideanoj kiuj iom interesighas pri la paco, bonvolu rilati kun mi (Emile) , por kune decidi tiun gravan agadon: espergala@wanadoo.fr

## Verdaj Partioj Tutmonde:

Retejoj kaj gheneralaj informoj pri kontinentaj federacioj kaj unuopaj naciaj partioj trovighas je:
globalgreens.org

**Afriko:** africangreens.org/
Eble niaj afrikaj AVEanoj povus subteni ilin je uzado de afrikaj lingvoj kaj Esperanto.

**Ameriko: verdesamericagreens.org/**

2009-10-22 **US** Verduloj nova estraro:
Jen la aktualaj estraranoj de la Usona Verda Partio: Mike Feinstein, 2000 - 2002 urbestro de Santa Monica, Kalifornio; Jill Bussiere, pedagogo, organika agrikulturo, Wisconsin; Sandra Everette, virinaj rajtoj, permakulturo, eko-vilagho, www.greensolutions.org ; Farheen Hakeem, komunuma organizantino en Minneapolis, Minnesota; Jason Nabewaniec, batalas kontrau korupcio, NovJorko, David Strand, homaj rajtoj, integrigho de krimuloj post la prizona tempo, Minnesota; Craig Torsen kaj Jody Grage, trezoristino; Holly Hart, partia sekretario, civila socio, Iowa.
**10 Kernaj Valoroj**: www.gp.org/tenkey.shtml
kaj pli detale: www.cagreens.org
Reformo de la elekto-sistemo en Usono al pli demokrata. Subteno de justa solvo inter judoj kaj araboj en la proksima oriento.

**Peto al Usona AVE-ano** - au membro kun kreditkarto: Riseup servas por la list-servilo [Verduloj], kaj estas la alternativo al Yahoo kaj Google.
Chu iu el niaj Usanaj mebroj povus subteni "Riseup" ?
Mi proponas fari tion kaj AVE akceptos tion kiel kotizo:
help.riseup.net/about-us/donate/

**Australio: greens.org.au/**

**Azio: .globalgreens.org/parties#asia**

**Japanio:** Estas du asocioj Midori-no-Kaigi
www.greenparty.gr.jp/
(en): site.greens.gr.jp/article/38256982.html
kaj kanagawanet.org/
Jena retejo informas pri Verdaj Partioj en Australio, Nov-zelando, kaj en europaj landoj. ...
geocities.co.jp/Milkyway-Vega/6529/midori.html
geocities.jp/wakonjuku/page010.html
Dankon al s-ano Hoshida Acushi

**Europo: europeangreens.org**

**2010-01-29/31**, Bruselo, Heerlen 8: greenyourope.net
*unua dato estis 13-15 Novembro, Lille, norda Francio:*
'*Europe Ecologie: pli ol nur Sukceso*
• Lernu kiel la Francaj Verduloj sukcesis salti de 1,57 ( prezidentelektoj '07) al 16,2 (Eŭropaj balotadoj '09) procentoj, kiel Écolo en la malferma debato: De Eŭropa Surprizo al Ĝenerala Avanco ...

**Se vi estas**
• Internacie pensanta kaj entuziasme deziranta esplori novajn horizontojn; • Kapabla ekvidi defiojn por translimaj kaj Eŭropaj partoprenado kaj partoprenigi aliajn; • bonega interkonektulo kun bone evoluigita reto ene de via partio; • Ne timante transiri landlimojn por establi novajn ligojn; • La angla, nia laborlingvo, estu facile por vi kaj krome vi parolas alian EU-lingvon • estas EGP subtenanto aŭ membro de Eŭropa Verda Partio. Kaj, espereble, aliĝu al kaj partoprenu en tion, kion la Verduloj/EFA en la Eŭropa Parlamento karakterizas kiel unu el ilia prioritatoj: „Profundigi demokration de malcentralizo kaj rekta partopreno de homoj en decidofarado kio koncernas ilin mem."
europeangreens.org

La komuna frakcio en la **Europa Parlamento** de la Verduloj kun Regionalistoj (7) kaj unu Pirato ricevis 55 seghojn: AT-2, BE-3, GB-5, DK-2, FI-2, FR-13, DE-14, GK-1, ES-2, LT-1, LU-1, NL-3, RO-1, SE-2:
Listo: www.greens-efa.org -> People
Esperantistoj en la EP: Reinhard Buetikofer (V) lernis eo-n antau 40 jaroj; kaj Malgorzata Handzlik denove estas en la EP - gratulon al ambau.
Komento al Leo Patek: post komunikado kun Reinhard: Jes, li lernis Esperanton antau 40 jaroj sed intertempe ne okupighis pri ghi. Li mem skribis: "Mi ne parolas Esperanton." Sed li diris ke ghi havus la

potenicalon interpacighi la arabojn kaj judojn.
Ekzistas Geremek-Grupo en la EP pri lingva politiko.

Elkoran dankon al tiuj kiuj agadis kaj vochdonis por la Verduloj. AVE daurigos la kontakton kun niaj MEP-oj. Ni diskutos kiajn pashojn eblas proponi al la Verda/ Regionalista frakcio por antauenigi la rolon de Esperanto kiel dauripova, justa kaj demokrata solvo de la EU-Babela lingvoproblemo.

Postenoj ofertitaj: Verda Frakcio en la EP serchas kunlaborantojn - www.greens-efa.org

Defendo de **interreta libereco** en Europo: nova partio "**Piratoj**" partoprenis la baloton al la EP; sveda pirato estis sukcese elektita kaj nun kunlaboras ene de la frakcio de la Verduloj kaj Regionalistoj.
Kompreneble AVE ne favoras novajn partiojn kiel ankau E.D.E. kun temoj kiujn la Verduloj jam prezentas , sed tiel funkcias demokratio. Ekzemple la Verdaj Partioj preferas neniigon de ret-paghoj kiuj estas kontrau la homa digno (diskutinde kie estas la limoj ..), anstatau bari paghojn. www.piratenpartei.de (lau "taz", 2009-07-23, p. 13)

FYEG, la Federacio de la **Junaj Europaj Verduloj,** verkis libreton pri Verda Ekonomio, kiu kovras multajn aspektojn de tio - chefe el vidpunkto de junuloj:
www.younggreeneconomy.org/wp/
Ilia gheneralа ret-pagharo: www.fyeg.org/cms/
Bedaurinde chio nur en la angla. Kaj ili ne sukcesis enmeti en la libreton la artikolon de Aaron Lukacs pri la ekonomia flanko de la lingva malegaleco.
Chiuj numeroj de www.ecosprinter.eu ,
la jhurnalo de FYEG, estas nun troveblaj elektronike.

FYEG elektis novajn parolistojn: Eline van Nistelrooij , NL and Gordan Isabegovic, BA, ktp.
The FYEG would furthermore like to welcome their new Full Member Organisations from Albania, Georgia, Greece, Slovakia, South Tyrol and Armenia, and their new Candidate Member Organisations from Azerbaijan, Croatia and Bosnia Herzegovina and are looking forward to working closely with each of these Young Green Organisations in a Federation that does not restrict itself to the EU member states. **fyeg.org**

Alvoko verki artikolojn: ekz-e pri via vizio. Por Ecosprinter, la jhurnalo de la FYEG. Ghi povus esti ankau pri la lingva maljusteco kaj la potencialo de Esperanto. Sed la artikolo devus esti en la angla. Konciza artikolo havas pli bonajn shancojn.

**Proponoj de la Nacia Komisiono pri lingvoj kaj Esperanto de la Franca Verda Partio**

Ekde ĉiam ludas la lingvaj demandoj decidan rolon en la konsistigo de popoloj kaj la konstruo de daŭro-kapablaj politikaj unuoj. Eŭropo por pli-fortigi sin kaj por partopreni en la nova mastrumado de la planedo, ne povos preterlasi la taskon difini koheran kaj efikan lingvan politikon.
Dubinde estas ke la ideologio, kiu regas en la Eŭropaj institucioj nuntempe, povus esti bazo de tia politiko. Fakte la oficiala doktrino pri multlingveco estas maltrafa je diversaj aspektoj.
- Ĝi baziĝas sur nerealisma konstato koncerne la vera rego-grado de fremdaj lingvoj fare de la EU-civitanoj.
- Ĝi estas, plej ofte, elpensita de instancoj havantaj partikularajn interesojn pri la uzo kaj instruo de lingvoj.
- Ĝi konfuzas , per la sama termino "multlingvismo", la netuŝeblan rajton de lingvaj grupoj uzi siajn proprajn lingvojn kun la nerealisma kaj kontraŭ-libera devigo al ĉiu civitano ke li aŭ ŝi regu plurajn lingvojn,
- Kaj, super ĉio, ĝi ne starigas la kernan demandon, laŭ demokrata vidpunkto, kiu lingva rimedo pli kapab-las ebligi al la plej multaj paroli je la plej alta nivelo.

Pli ĝenerale, oni estas devagita konstati ke tiu "mult-lingvisma" doktrino, ĝis nun ne bremsis la privilegiitan uzon de la angla - kreante malegalaĵojn, kiuj kontraŭ-as la bazajn justeco-principojn de la Verduloj.

Ni rememorigas ke la Verduloj malakceptas kiajn ajn malŝparaĵojn, kaj ke je la momento kiam la limoj de la globa kreskado jam estas atingitaj en multaj kampoj, gravas ke publikaj politikoj estu direktitaj prioritate al la efika uzo de ĉiuj rimedoj cele al malgrandigo de nia ekologia piedpremo. Tial la Eŭropa Verda Partio starigas la sekvajn punktojn rilate al la lingva politiko.

1. La rezultoj de la politikoj ĝis nun sekvitaj devas esti en ĉiu lando de Eŭropo submetigitaj al serioza taksado, proporcie al la elspezoj efektivigitaj. Tio necesigas la rigoran aplikon de la nova Eŭropa Komuna Kadro pri Lingvoj, precipe koncerne per-ekzamena taksado.
2. Eŭropo kaj la nacioj kiuj ĝin konsistigas devas doni ĉiujn ŝancojn al la eksperimenta programo "Lingvo Lanĉilo" nun disvolviĝanta en kelkaj lernejoj tra Eŭropo, kiu koncernas la uzon de Esperanto kiel propedeutika (lernado-enkondukan) ilo por la lernado de diversaj lingvoj. Estas konsiderinde ke Esperanto posedas Eŭropan leksikan vort-provizon kaj ankaŭ raciigitajn gramatikon & vort-faradajn principojn. Tio faciligas kaj ĝian lernadon kaj la asimiladon de gravaj lingvistikaj nocioj, kiuj nune estas regitaj nur de la malplimultaj Eŭropaj gelernantoj, je la fino de iliaj devigitaj studoj. Tiu lingvistika bazo faciligas la lernadon de aliaj lingvoj.
**www.springboard2languages.org**/home.htm
www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm
*(iomete koncizigita de AVE/mw)*

**kelkaj tekstoj trovighas pli detale en la retejaj dosieroj de : **www.verduloj.org/34/kapo.htm**

AVE, Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen